**STATUTO DE JUNULARA ESPERANTISTA DE TANZANIA ORGANIZO ( JETO)**

1. **NOMO KAJ CELOJ**

1.1 La nomo de la junulara organizo estas “Junulara Esperantista de Tanzanio Organizo” (JETO)

1.2. Celoj de JETO estas:-

a. Subteni la internacian lingvon Esperanto kiel rimedo por internacia komunikado,
b. Informi junajn homojn en Tanzanio pri Esperanto,
c. Iniciati kaj subteni projektojn pri internacia kunlaboro de junaj homoj kun eluzo de la lingvo Esperanto.
d. Organizi klerigajn kaj kulturajn aranĝojn en Esperanto aŭ direktitajn al Esperanto,
e.Kunlabori kun organizaĵoj, kies celoj kongruas kun tiuj de JETO.
f. Kunigi tra sia lando junajn uzantojn de Esperanto

1.3. La sidejo de JETO estas en Bunda-Mara .La sidejo de JETO cxiun momenton moveblas ĉien ajn en lando laŭ la decido de la ĝenerala asembleo.

2. **MEMBRECO**

2.1. Ĉiu fizika aux morala persono aĝanta 15 jarojn aŭ malpli 35 jarojn, konsentanta kun la statuto, povas iĝi regula membro de JETO. La membreco estiĝas tage de la enskribo en la membroliston, tenatan fari la estraro.

2.2. Fizika aux morala persono aĝanta malpli ol 15 jarojn povas iĝi infana membro de JETO. La infanaj membroj ne havas voĉdonrajton ĉe la asembleo. Tage de aĝiĝo je 15 jaroj la infana membro aŭtomate iĝas regula membro de JETO.

2.3. La membreco en JETO malestiĝas per:-

i. Memvola decido de la membro anoncita al la estraro,
ii. Nepagado de la membrokotizo dum pli ol unu jaro,
iii. Forpaso de la membro.

2.4. La regula membro rajtas:-

i. Partopreni la asembleon, paroli kaj voĉdoni ĉe la asembleo,
ii. Elekti kaj esti elektata en la organojn de JETO per sekreta baloto aux per mano-levigo se la statuto tion permesas al li (ŝi).
iii. Esti informata pri la planoj kaj agado de JETO.
iv. Esti informata pri la financa stato de JETO

2.5. La regula membro devas:

i. Respekti la statuton de JETO,
ii. Pagi la membrokotizon.

2.6. Se la membro agas malkongrue al celoj kaj planoj de JETO aŭ damaĝas al ĝia reputacio, la estraro povas ŝi/lin malmembrigi. La membro povas apelacii kontraŭ la malmembrigo al la asembleo.

3. **LA ASEMBLEO**

3.1. La asembleo estas la plej alta organo de JETO. Ĝi kunvokatas minimume unu foje jare.
3.2. La asembleon kunvokas kaj gvidas la prezidanto de JETO, aŭ la persono kiun pri tio komisias la prezidanto de JETO.
La tempo kaj la loko de la realigo de la maleksterordinara asembleo devas esti anoncita al ĉiuj membroj almenaŭ 35 tagojn antaŭe.
Pro postulo far la plimulto de la estraro aŭ far almenaŭ du trionoj de la membraro de JETO devas eksterordinara asembleo esti kunvokita ĝis 30 tagoj ekde la prezento de la postulo.

3.3. La asembleo estas decidpova, se ĉeestas almenaŭ du trionoj de la membraro.
3.4. Ĉiu vocxdonrajta membro ĉeestanta ĉe la asembleo havas unu balotvoĉon.

3.5. La asembleo per du trionaj plimultoj da voĉoj:-

i. Akceptas kaj ŝanĝas la statuton de JETO,
ii. Malelektas la estraron aŭ ĝiajn unuopajn membrojn,
iii. Estigas kaj malestigas ceterajn organojn de JETO,
iv. Decidas pri apelacio de la membro kontraŭ malmembrigo.

3.6. La asembleo per simpla (traduknoto: superduona) plimulto da voĉoj:-

i. Elektas estraranojn,

ii.  Fiksas la membrokotizojn,
iii. Aprobas la budĝeton kaj decidas pri aliaj financaj aferoj.

4. **LA ESTRARO**
Gxi konsistas el kvin postenoj : Prezidanto,Sekretario, Kasisto, Organizanto kaj Informado.
4.1. La estraro kunordigas la agadon de JETO, kaj dum la tempo inter asembleoj ĝi estas la plej alta organo de JETO. Ĝin elektas la asembleo por funkciperiodo de 3 jaroj. La estraro havas almenaŭ 3 membrojn. Dum neekzistado de la estraro ĝiaj rajtopovoj transiras al la asembleo.

4.2. Estrarani povas nur plenaĝa (traduknoto: laŭ la Tanzanio leĝo te. almenaŭ 18 jaroj) regula membro de JETO kiu tage de la elekto aĝas malpli ol 35 jarojn ekcepte se li estas en la estraro. La membro povas esti elektita estrarano por ne pli ol 3 sinsekvaj funkciperiodoj.

4.3. La estraranoj komence de la funkciperiodo elektas inter si per simpla (traduknoto: superduona) plimulto aliaj helpantoj.

4.4. La estraro realigas jenajn aferojn:
i.  Konsistigas la agadplanon kaj budĝeton, kiujn ĝi prezentas por aprobo al la asembleo.
ii.  Organizas la realigon de la agadplano kaj solvas rilatajn teknikajn problemojn.

4.5. La estraro decidas per simpla (traduknoto: superduona) plimulto. Por valideco de jura ago estas bezonata aprobo far la prezidanto.

5. **MASTRUMADO**
5.1. Enspezfontoj de JETO estas precipe membrokotizoj, donacoj, grantoj kaj monsubvencioj. La havaĵo povas esti uzata por akirado de la celoj de JETO kaj por prizorgo de ĝia propra agado.

5.2. Pri mastrumado de la havaĵo respondecas la prezidanto de JETO, aŭ la persono komisiita pri tio far la estraro.

5.3. Kaze de malfondiĝo de JETO per unuiĝo kun aux al iu civitana asocio, la tuta havaĵo de JETO transiras al tiu asocio. Kaze de alimaniera malfondiĝo de JETO, la havaĵo transiras al unu aŭ pluraj civitana(j) asocio(j) kies celoj proksimas al la celoj de JETO

6. PROVIZORAJ REGULIGOJ
6.1. Tage de estiĝo de JETO la membroj de la preparkomitato aŭtomate iĝas membroj de la estraro. La funkciperiodo de tiu estraro estas tri jaroj.

**LA GXENERALA ASEMBLEO.**

**INTERNA REG LAMENTO DE JUNULARA ESPERANTISTA TANZANIA ORGANIZO ( JETO)**

**I: ĜENERALAĜO**

1.1 La aliĝo al Junulara Esperantista Tanzania Organizo ( JETO) estas libera kaj volonta sed post pago de aliĝkotizo fiksita de la Ĝenerala Asambleo.
1.2 Ĉiuj membroj de JETO devas:

a-bone regi la statuton kaj internan reglamenton de JETO
b-akurate pagi sian kotizon
c-aktive agadi por defendi materialojn kaj moralajn interesojn de la organizo
d-konformiĝi al la disciplino kaj reglamento de la organizo
e-subteni la celojn de TEJO

1.3 cxiu membro, kiu konformiĝas al la enhavo de artikolo 1.2 rajtas baloti kaj esti elektata je iu ajn posteno de la sekcio se la statuto tion permesas al li(ŝi).

II : **STRUKTURO KAJ FUNKCIADO**

1.4 Ĝenerala asembleo konsistas el :
a-la estraro
b-la membroj de la organizo
c-simpatiantoj por esperanto.La simpatiantoj ne rajtas baloti kaj esti elektitaj je iu ajn posteno de la organizo.

1.5 la estraro estas la plenumorgano de la organizo.

1.6 Ĉiu estrarano devas almenaŭ scipovi esperanton.

1.7 la estraranoj de la organizo devas kapabli kunlabori, rilati kun aliaj organizoj kun sama celo, kapabli sola labori.

1.8 la prezidanto de la organizo,JETO konvokas kaj gvidas kunvenojn de la estraro. Li ordonas elspezojn, tiucele necesas ankaŭ subskribo de la kasisto.

1.9 la sekretario respondecas pri libro-tenado, protokoloj de kunvenoj, arkivoj kaj korespondaĵoj de la organizo.

1.10 la prezidanto respondecas pri posedaĵoj de la organizo
1.11 la Organizanto zorgas pri la organizado de ĉiuj agado de la organizo precipe pri junularaj aranĝoj.
1.12 la Informanto zorgas pri :
informado de la organizo al ĉiuj tanzaniaj esperantistoj, kiuj ne konas ĝin precipe junuloj ;
informado pri agadoj de la organizo al ĉiuj esperantistoj.

1.13 la komitato ludas gravan rolon pro definita tasko kaj devas esti kapabla konsili la estraranon pri taŭga strategio por antaŭenigi la movadon de la organizo.

**III : FINANCOJ**

1.12 La kasisto zorgas pri kotizoj ĉiuspecaj de la organizo.

1.13 la kasisto devas kapabli disponigi liston de la monfluo ĉiumonate

1.14 pri neantaŭvidataj elspezojn respondecas nur la prezidanto post peto de opinio ĉe la ceteraj estraranoj. Pri ĉiu misuzo de la organiza havaĵo kulpas nur ties ordonanto(j)

1.15 la kasisto respondecas pri arkiviĝo de financaj dokumentoj, kiuj devas laŭ peto de iu ajn membro de la estraro stari je dispono de iu ajn membro de la organizo
1.16 la mono de la prganizo devas esti deponata kaj ĝirata en banko

1.17 la kasisto ne havu ĉemane pli ol 50.000 tŝ

1.18 la kasisto devas daŭre aktualigi la staton de la financo

**IV : DISCIPLINO**

1.19 Bazaj principoj de demokratio, t.e akcepto de la decido de la plimulto estu rigore observataj. Ĉiu respondeculo devas sin montri deca.

1.20 Ĉiu malordo kontraŭ bona etoso de la funkciado de la organizo kaj ties celoj okazigas eksigon de ties ordonanto aŭ aganto en la organizo.

1.21 jenoj estas konsiderataj kiel malordoj de la organizo :
a-malakcepto de la decido de la plimulto
b-engaĝigo la organizo en ia ajn afero sen antaŭe permeso de la estraro
c-kalumnio per sia konduto de la organizo kaj ties strukturoj
d-misuzo aŭ ŝtelado de la organiza havaĵo
e-ĉiu ajn konduto, kiu ebligas malordon kaj moralan malkonsideron por la organize

1.22 ĉiu nerespekto al la statuto kaj la reglamento okazigas jenajn sankciojn aŭ punojn :
a-averton
b-admonon
c-provizoran eksigon
d-eksigon

1.23 Post opinio de la asembleo la estraro plenumas la sankciojn

1.24 Nur la asembleo rajtas aldone kompletigi aŭ ŝanĝi tiun ĉi reglamenton.

Bunda, la 13-an de januaro 2020

**LA ĜENERALA ASEMBLEO.**

Aktiveco de JETO:

- JETO instigos al junaj uzantoj de Esperanto en sia lando aliĝi al TEJO
- Organizos junularan aranĝon en sia lando
- kunlaboradi kun TEJO
- instigi ĝian membraron interesiĝi pril la trejnseminario de TEJO
- instigi ĝian membraron aliĝi al Pasporta Servo
- favori la instruadon de la lingvo.
- favori la kreadon de sportaj esperantistaj teamoj
- instigi junajn esperantistojn verki librojn (teatrajxojn,filimanoj, romanojn, poemarojn)
-konigi nian tradician kulturon en esperantistaj medioj.

**FONDINTOJ KAJ ESTRARANOJ**

1. JOHN EMMANUEL MAGESSA ( Prezidanto)

2. PAUL KATUJU KUSAYA (Sekretario)

3. SAMWEL D. ROBERT (Organizanto)

4. BARAKA MOHAMED (Informanto)

5. DEUS BUHIGI PONSIAN (Kasisto)